

Prelego por Esperantista klubo en Brno, la 23-an de aprilo 2014

Zdeněk Závodný

Artileristoj kontraŭ aviadistoj

Karaj gesamideanoj, enkonduke mi volas klarigi, ke per mia prelego mi ne intencas glorlaŭdi militon, sed nur rememori kelkajn humoraĵojn el vivo de soldatoj en armeo (laŭ inspiro de la slovaka verkisto Gejza Vámoš).

Temas pri okazaĵoj el foraj tempoj, kiam nur malmultaj homoj vidis televidilon kaj neniu mortulo aŭdis ion pri Interreto aŭ poŝtelefono kaj por soldatoj tiutempe plej gravaj estis salutado, rigidstarado, poluri ŝuojn kaj butonojn, parademarŝoj, ekzercadi kun fusilo kaj marŝoj kun kompleta ekipaĵo kaj fusilo.

Mi rememorus, ke dum mia militservo la komundanto de nia taĉmento (plotono) la superleŭtenanto Vrtěna min ofte admonis per tiuj vortoj: "Nu kamarado ĉefsoldato, kial vi volas prosperi en la vivo, se butonoj sur via bluzo nur nesufiĉe brilas?"

Sed nun al nia temo Artileristoj kontraŭ aviadistoj.

En foraj tempoj, kiam militservo estis honora devo por ĉiu juna viro, ofte okazis, ke en unu garnizono (urbo) vivis soldatoj de diversaj armebranĉoj - infanteristoj, artileristoj, tankistoj, aviadistoj, sapeistoj (saperoj), radiofonistoj kaj aliaj. Kutime inter soldatoj de tiuj individuaj armebranĉoj regis granda rivaleco pri tio, kiu estas pli grava, pli forta kaj sekve vespere en bierdrinkejoj ofte okazis bataloj per rimenoj kaj pugnoj. Sed dum ekzercoj tiuj rivaloj devis kunlabori. Do, foje okazis, ke artileria regimento havis pafekzercon en la arbaroj en la ĉirkaŭaĵo de Strašice kaj ĝia aktiveco estis kombinota kun la aktiveco de aviadistoj el Plzeň.

La scenografio supozis, ke la artilerianoj pafos kontraŭ supozitaj malamikaj soldatoj malproksime kaŝitaj en tranĉeoj kaj la tasko de aviadistoj estos malkovri la pafantajn artileriajn bateriojn kaj en kazo, ke ili sukcesos, per sovaĝa pafado de mitraloj anonci, ke ili trovis la objekton.

Do, antaŭ komenco de manovroj ambaŭ flankoj fanfaronis. Ni kaŝos nin kiel muso en sian truon kaj vi aviadistoj eĉ per mikroskopo ne trovos nin, proklamis la artileristoj. Vi povos vin kaŝi sub la teron, sub la akvon ni trovos vin ĉie, respondis memfide la aviadistoj.

Tiamaniere en ambaŭ flankoj ennestiĝis la vera batalspirito.

Do, venis la rosokovrita mateniĝo kaj la veksignalo sonis tra la artilerista bivako. Al kiu ne sufiĉis la trumpeto, al tiu helpis unu sitelo da malvarma akvo. Antaŭ matenmanĝo komencis la korpekzerco - mi invitas vin partopreni la ekzercon, ĉar kiel diras la germana kancelierino Angela Merckel "Winterspeck muß weg" (Vintra lardo devas malaperi). Do la junularo bonvolu ekzerci kune kun mi kaj senioroj batos la tempon - laŭte kalkulos ĝis dek ses, kongrue al 16 gramatikaj reguloj de Dro. L. L. Zamenhof.

Post la korpekzerco kaj matenmanĝo ĉiuj sidis sur ĉevaloj kaj atendis la alvenon de la regimenta komandanto, kolonelo Rampula.

"Jesus Maria, tricent flamaj fulmoj", eklamentis la ĉefo de la regimenta stabo, majoro Vondrak. "Sur kion ni sidigos sinjoron kolonelon, lia ĉevalo havas vunditan piedon, do iu el ni devos oferi sin kaj cedi sian ĉevalon al sinjoro kolonelo". En tiu momento jam aperis kolonelo Rampula, satdorminta, satmanĝinta, butonoj sur lia bluzo brilis kiel steloj sur vintra ĉielo.

"Ĉu sinjoro kolonelo bonvolos veturi sur ĉaro aŭ rajdi sur ĉevalo" demandis la ĉefo de la stabo. "Kompreneble sur ĉevalo - mi ne estas suĉinfano, ke mi veturigu min sur ĉaro!" respondis la kolonelo. "Tiukaze, sinjoro kolonelo, bonvolu elekti unu ĉevalon de ni, ĉar via ĉevalo bedaŭrinde estas malsana. Do, la kolonelo mglrapide pasis de unu ĉevalo al la alia kaj fine ekplaĉis al li la bela ĉevalo Fuks, sur kiu sidis la juna kuracisto de la regimento, serĝento Kahánek. La ĉefo de la stabo klarigis al la kolonelo, ke tiu ĉevalo apartenas al la regimenta kuracisto.

"Nu kion, la kuraciston ni sidigos sur la sanitaran ĉaron sur la ĉerkon kaj la muzikistaro ludu al li la funebran marŝon de Chopin, ĉar tio estas la plej trafa simbolo de la sanitara aktiveco en la armeo", per tiuj vortoj kolonelo Rampula konfiskis la ĉevalon de la juna doktoro.

Certe por la juna kuracisto, kies rajdistaj bravaĵoj estis ĉe la regimento konataj kaj admirataj, tio estis nepardonebla malhonorigo. Imagu, la tuta oficistaro pompe rajdas frunte de la marŝkolono antaŭ la okuloj de multaj fraŭlinoj kaj sinjorinoj, nur li regimenta kuracisto estas veturigota sur la sanitara ĉaro kiel iu kriplulo. Nu, ili ja bone frapis min sur la buŝon, sed mia venĝo sekvos kaj ili bedaŭros, ke ili konfiskis mian ĉevalon, promesis la humiligita juna kuracisto.

Do, komencis la ekzerco, la baterioj enfosis sin ĉe rando de arbaro, la soldatoj maskis sin laŭ ordonoj de kolonelo kaj krome estis eldonita severa ordono, ĉiu devas kaŝi sin sub la arbustoj, la ĉevalojn necesas kaŝi profunde en la arbaro tiel, ke estu videbla neniu vivaĵo.

Apenaŭ kanonoj estis kovritaj per verdaĵo kaj branĉaro jam de malproksime ekzumis la motoroj de 16 observaj aviadiloj. Bum-bum-bum-bum ektondris la kanonoj el la arbaro kaj aviadiloj proksimiĝis. La unua aeroplano rondflugis super la arbaro kaj la artilerianoj streĉe atendis ĉu eksonos la krakado de la mitralo de aviadilo, kiel signo, ke la observanto trovis la maskitan baterion. La maŝino rondflugis denove super la arbaro, kie ĝi supozis la kaŝitajn artileristojn, sed ĝi trovis nenion kaj forflugis por serĉi aliloke. Ĉiuj ĝojis pro la rezulto, sed post momento la flugmaŝino revenis.

Nun venis tempo por mia venĝo, ekpensis la doktoro, do li deprenis sian bluzon kaj kuŝiĝis, nur en sia blanka ĉemizo, en la mezon de arbostumpejo. La observisto en la maŝino tuj ĝoje ekkrakis pa-pa-pa pa-pa kaj se estus la vera milito, bomboj jam estus falantaj sur la trovitan baterion.

Do, la artileristoj malvenkis la unuan duelon kaj la tendaro ekmoviĝis pluen. Ili eniris profunden en la arbaron kaj ennestiĝis denove. Kolonelo Rampula rajdis ĉirkaŭ la baterioj por certigi la sukceson de la maskado kaj promesis pafmortigi ĉiun, kiu ne kaŭros kiel rato sub la arbusto.

Nun la kanonoj ektondris denove bum-bum-bum kaj el malproksimo ekbruis motoroj de aviadiloj. Nun doktoro devis esti pli singardema, do li derompis branĉeton de unu arbo kaj elsub la arbusto kelkfoje svingis per blanka poŝtuko alligita al ĝi. La

aviadisto entuziasme reciprokis desupre lian saluton kaj per senkuglaj kartoĉoj dispafis la kaŝitan tendaron je eroj. La efiko estis nepriskribebla, ĉar ĉiuj zorgoplenaj preparoj de la artilerianoj estis detruitaj jam la ĉe la unua rondflugo de la flugmaŝino. Do, artileristoj denove malvenkis. Ili faris ankoraŭ la trian provon, la artileristoj zorgeme faris ĉion kredinte, ke tiun ĉi fojon ili jam sendube venkos - kaj imagu dum la plej granda streĉo subite ekaperis sur la arbostumpejo unu ĉevalo. La observisto en la aviadilo ĝoje ekpafis pa-pa-pa-pa en la orelojn de la malfeliĉaj artileristoj, kiuj en tiu tago trifoje malvenkis.

Poste dum la kunveno, la staboficiroj pridiskutis la eventon kaj kelkaj el ili atentigis, ke la doktoro Kahánek estis tre humiligita per la konfisko de lac amata ĉevalo kaj estis decidite tuj redoni ĉevalon Fuks al la doktoro.

Post tri tagoj okazis la decida ekzerco, dum kiu la aviadistoj senrezulte longe serĉis la bone maskitajn bateriojn - neniuj salutsignalo aperis kaj la artileristoj meritplene venkis en tiu decida duelo.

Do fino bona, ĉio bona.

Punkto, fino, mi dankas pro via atentemo!